

Numero: 273.
Februaro: 2015.

23-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espBELA@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Ĉu Esperanto povas stopi militon?

Ni vivas en la ombro de proksima milito. Surstrate la homoj demandadas unu de la alia: Ĉu baldaŭ erupcios la tria mondmilito? Esperanto jam travivis du terurajn militojn. Ĉu ankaŭ nun ni estos tiom sukcesaj?

La nuna generacio konas militojn el lernolibroj, televido. Mi estas konvinkiĝinta, multaj homoj opinias pri ĝi, ke la milito estas bonega aventuro. Fine ĉiu saviĝos kaj se ĝi ne plaĉas, tiam oni povas malŝalti la televidilon.

Kion ni, geesperantistoj povas fari kontraŭ la milito?

Eble nenion. Aŭ tamen? Mi ne scias. Mi havas dubojn pri tio. Ĉu gravas, se kelkaj geesperantistoj protestas? Ĉu oni aŭdas nian vekriegon? Ofte ne estas aŭdebla, se centmilionoj kriegadas, larmas kaj ĝemadas.

Ni ne estu sorĉitaj kaj ni ne kedu, nia ideo la paca kunvivado jam realiĝis? Tio estas iluzio. La mondo apenaŭ konas nin kaj nian lingvon. Ni ne luligu nin, ke la zamenhofa lingvo superas ĉion.

Mi havas geamikojn en Ukrainio kaj eĉ en Rusio. Kiun mi subtenu? Al kiu mi diru, amiko oni pravos. Via batalo estas sankta kaj justa.

Esperanto estas nur ilo per kio oni povas komuniki kaj pli facile kompreni sin.

Ni atendis tro multe de la internacia lingvo. Tio ĉi trompis la homojn, kiuj interesiĝis pri ĝi. Estis bela sonĝo kredi, nia lingvo solvos ĉiun problemon sur la tergloblo.

Laŭ mi estus pli bone, se en la estonto Esperanton ni uzus nur simple por komuniki. Ĝi estu lingvo per kio malaperos la lingvaj bariloj kaj falos la muroj, kiuj staras inter diverslingvaj homoj.

Paco devas regi en la koro de ĉiu homo. Tion ne influas, se oni parolas diversajn lingvojn.

Mi scias, nun multaj ne samopinias kun mi. Verdire iam ankaŭ mi kredis, ke Esperanto alportos MONDOPACON.

Nia amata lingvo nur helpas en la komunikado. Vere ankaŭ tio ĉi estas brila rezulto por la homaro.

-Redaktanto-



Kiun lingvoj parolas la formikoj?

En iu tago mi rigardis la formikojn, kiuj tien-reen kuradis. Ĉiu sciis, kion fari. Inter ili ne estis, eĉ unu, kiu estintus neniofaranto. Ĉiu formiko diligente laboris kaj sekvis la praan leĝon.

En tiu granda formika socio, kie vivas pluraj dekmiloj da malgrandaj insektoj.

Kiel komunikas la formikoj? Ĉu ankaŭ ili uzas iun lingvon?

Mi tre ŝatus ellerni ĝin. Ŝajne en la formika socio ne ekzistas babelaj lingvokonfuzoj. Ili perfekte komprenas unu la alian.

Se ankaŭ la homaro ellernus tiun ĉi metodon, eble tiam la mondo pliboniĝus.

Kiel mi rigardis ilin, subite eklumis lampeto en mia cerbo. – Ĉu la formikoj uzas Esperanton por kompreni sin?

Ili scias ion, ĉar la laboro, vivo estas bonorda. Ne ekzistas lingvaj miskomprenoj kaj aliaj malfacilaĵoj.

Estus laŭdirinde ellerni ĉi metodon de la formikoj. Ni homoj komunikas en centoj da lingvoj, tamen ni ne komprenas unu la alian. Ni lernas diversajn fremdajn lingvojn dum longaj jaroj. Malgraŭ tio la rezulto estas mizera. Ni apenaŭ povas ekparoli en iu lingvo. Eksterlande ni nur balbutadas serĉante la ĝustajn vortojn kaj esprimojn.

Mi ne kredas, ke formikoj havas lingvaj malfacilaĵojn. Ili povas orientiĝi kie ajn en la tuta mondo.

Estus interese fari eksperimenton kaj aron da formikoj transporti en iun malproksiman landon eĉ kontinenton. Tie atenti ilin, kiel ili povos ekzisti kaj komuniki kun la tieaj formikoj.

Mi ne scias kio estus la rezulto de la eksperimento, sed mi estas konvinkiĝinta, ke la transportitaj formikoj ne havus lingvaj malfacilaĵojn.

Do, karaj insektologiistoj ne hezitu, ekzaminu tiujn ĉi malgrandajn estaĵojn, kiel ili povas komuniki en la labirinta formikejo, kie vivas multegaj samsortanoj.

Mi deziras scii, kiun perfektan lingvon ili parolas unu kun la alia?

-Ŝaŝa-



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
VIII-a

-Kie mi estas? – demandis konfuziĝante de si mem Johano, kiam li malfermis siajn okulojn.

Li komprenis nenion. La ejo estis tre malhela. Li vidis apenaŭ ion. Lia korpo estis forte ligita al la lito kaj li ne povis movi. Vane li provadis liberigi siajn manojn kaj piedojn sensukcese.

Krom la malhelo en la kelo estis ankaŭ malvarmo. Ŝajne la muroj estis malsekaj kaj ŝimaj.

Kio okazis al li? – li ne sciis.

Kial li estas tie ĉi? – Tio estas granda enigmo. Li rememoris pri la lastaj minutoj, kiam li agrable amuzis kun bela fraŭlino kaj ĉio estis belega. Ili trinkis bongustan vinon. Li estis tute sorĉita de la travivaĵoj.

Kie estas nun Elinjo? Ĉu ankaŭ ŝi estas ie en tiu ĉi abomena loko. Johano klopodis ĉirkaŭrigardi, kiel tion la rimenoj lasis. Ĝis li povis rigardi, tie li ne vidis ŝin. En la malantaŭa parto de la kelo estis tre malhelo. Krom tio tiun teritorion li ne povis traserĉi per siaj okuloj. En tiun direkton li ne povis movi sian kapon.



Li komencis vokadi la nomon de la virino:

-Elinjo, ĉu vi estas tie ĉi? Elinjo!

Li ne ricevis respondon. La kelo estis silenta kaj muta. Nur liaj vortoj eĥis ene, kiam li ekparolis.

Kelkfoje li ripetadis la vokadon de Izabelo, sed baldaŭ li devis konvinkiĝi, ke li estas sola. Krom li neniu estas en la kelo.

Tio ĉi estis ege timiga. Pleje tio ĝenis, ke li estas senhelpa.

Li longe rigardis la plafonon. Ĝi estis arka kaj grandaj pecoj faladis el ĝi sur la pavimon. Meze pendis aĉa lampo senlume. Apud la muroj estis videblaj rustaj metaloŝrankoj kaj kelkaj kadukiĝintaj bretoj. Malproksime de li vidis malpuran vitroskatolon, kiu similis al neuzita akvario. Sed ĝi ne estis akvario. En ĝi estis nenio, almenaŭ li tiel vidis.

Johano ekprovis diveni, kial li estas tie ĉi. Li ankoraŭfoje trapensis la okazintaĵojn. Subite antaŭ liaj okuloj ekaperis la vizaĝo de sia onklino Izabela. Eble la maljunulino antaŭsentis ion aŭ sciis. Tial ŝi estis tiom stranga.

Nun estus bone scii pro kio aŭ pro kiuj ŝi timis. Ĉu ŝi serĉas lin? Efektive li ne sciis, kioma horo estas nuntempe. Johano perdis sian temposenton.

Ĉu estas tago aŭ nokto? Estus bone scii. En la kelosimila ejo eble tio ne gravas.

Ankoraŭfoje li provadis liberigi sin. La rimenoj estis fortaj. La kuŝado jam estis ege malagrabla. La malmola plato de la lito dolorigis sian dorson. Li ne povis ekmovi, ŝanĝi iom la lokon.

Pleje tio estis ĉagrena, ke li ne komprenis, kial li estas tie ĉi.

Almenaŭ iu venus kaj dirus la kaŭzon de lia mallibereco. Laŭ li estis farita nenio pro kio li devus suferi.



Ĉu ĝi estus nur idiota ŝerco de la lunanoj? Eble post kelkaj minutoj enkuregos Elinjo kaj ridante liberigos lin kaj ŝi diros, ke tio ĉi estas tia iniciato por novalvenintoj.

Dum li pensis pri tio, Johano iom gajiĝis, eĉ eble li ankaŭ ridetis. Sed en la sekva minuto li denove malgajiĝis. Tiu ĉi ne povas esti ŝerco. Kial oni farus tion al li. Li jam kuŝas tie ĉi delonge. Eble la tutan nokton li pasigis en la malhela, timiga kelo.

Johano denove ĉirkaŭrigardis, sed en lia malliberejo nenio ŝanĝiĝis.

Lia sufero plu daŭris kaj li ne vidis la finon.

Eble iom li endormiĝis pro la laceco. Vere la lito estis senkomforta. Lia tuta korpo terure doloris lin.

Li vekigis je la bruo de la proksimiĝantaj paŝoj. Johano ekscitiĝis. Nun li almenaŭ ekscios la veron. Li nur esperis sekrete, ke tio estos trankviliga por li.

Li ĝeme elbuŝigis:

-Mi estas tie ĉi.

(-daŭrigota-)



Poezio

-Mi ne deziras legi versojn – diris junulo. – Prefere mi rigardas bildojn pere de interreto.

Ĉu tio ĉi estas ĝusta vojo? Tiuj, kiuj asertas, ke la poezio jam estas malmoda, ne estos pli malriĉaj. Io mankos el ilia koro kaj animo. La bildoj kaj fotoj ne povos montri, kion vidas nur la koro. La poemoj flugigas nin al eksterordinara mondo. Ĝi plivastigas nian fantazion kaj donas al ni esperon kredi la estonton.

Do, legu ĉiutage poemojn kaj ne eljetu viajn poemlibrojn en la rubujon!

Verdaj karavanoj de Mikaelo BRONŝTEJN

Mi eltrinkis lastan
gluton
El someraj
rememoroj,
Kontraŭtristan
kuracilon
Iluzian,
multkoloran.
Kaj ekvibris
malsereno
En etende vastaj
horoj,
Kiam venis voko
venta
De la verda
karavan'.

Verdaj karavanoj,
verdaj karavanoj
Migras ĉiujare al
la verda land',
Al sinceraj sentoj,
al amikaj manoj,
Prenu min hodiaŭ,
verda karavan'.

Por la tempo
trankviliga,
Por semajno
multimpresa
Prenas min insul'
espera
En la ŝtorma
oceano.
La unikan verdan
landon,
La insulon de l'

Kongreso.
Trans la jaro, trans
la vojo
Venos verda
karavan'.

Mi forviŝos lantan
larmon
Aŭ subitan pluvan
guton
En angoro adiaŭa
Ĉe vespera
vagonaro.
Prenis la kuranta
tempo
La semajnon en
minuton,
La minuton de l'
feliĉo
En la longa, longa
jar'.



Al la vespera stelo Richard WAGNER elgermanigis Antoni GRABOWSKI

Funebre kovras la krespusko
valon,
Etendis nokto nigran la vualon.
Deziras supren flugi la anim',
Sed tenas ĝin de nokt-teruroj tim'.

Aperas jen, vi stelo la plej kara!
De malproksimo fluas lumo klara,
Disigas ombrojn ĉarma la radi',
Amike montras la vojon al mi.

Ravite, ho vespera stel',
Mi vin salutas sur ĉiel';
Kaj de fidela mia kor'
Salutu ŝin en tiu hor',
Kiame flugos ŝi de l' tero,
Al anĝelar' en supra sfero.



Por infanoj

La pomo de la maljunulino



Trans Fabeloceano en malgranda vilaĝo vivis maljunulino. Ŝi havis ĝardenon, kaj en ĝi estis granda pomarbo. Sur tiu ĉi pomarbo kreskis pomo dum la tuta jaro. En ĉiu sezono pendis sur ĝi belegaj, grandaj fruktoj.

La maljunulino ne estis avara, kiu petis, tiu ricevis de ŝi belan, ruĝan pomon. Sed ĉiufoje ŝi donis nur unu.

En iu tago riĉulo ekvidis la belegan pomarbon kaj li deziris ĝian frukton. Li sendis sian serviston al la maljunulino, por ke li petu pomon.

Baldaŭe la servisto revenis portante unu pomon. La riĉulo ege koleriĝis:

-Ĉu vi portis nur unu pomon? – li diris. – Reiru kaj ŝi donu al mi ĉiom da pomoj. Se ŝi ne plenumos mian ordonon, mi punos ŝin.

La servisto reiris al la domo kaj li transdonis la mesaĝon de sia mastro.

La maljunulino nur balancadis sian kapon, sed ŝi donis ĉiom da pomoj. Kiam la servisto volis foriri, ŝi diris al li.

-Diru al via mastro, ke la pomoj estu disdonitaj al la malriĉuloj! Se li ne faros tion, tiam okazos malbono al li.



Kiam la riĉulo ekaŭdis ĝin li komencis ridegi laŭte:
-Mi ne estas stulta fordonaci la pomojn. Mi vendas ilin. Unu pomo kostas unu orotaleron. Baldaŭe mi fariĝos pli riĉa homo.

Li iris al la vendoplaco kaj li proponadis al la preterirantoj la frukton:

-Aĉetu pomon! Ĝi kostas nur unu orotaleron.

La pomoj estis grandaj kaj belegaj. La homoj feliĉe aĉetis ilin. Dum kelkaj minutoj li forvendis ĉiom. Lia monujo rapide pleniĝis. En ĝi estis multe da orotaleroj. Tamen li ne estis kontenta. La riĉulo sciis, ke la arbo senĉese produktas frukton. Li ne hezitis, tuj iris al la maljunulino kaj nun jam propramane rikoltis ĉiom da pomoj. Ankaŭ ilin li forvendis sur la vendoplaco.



De tago al tago li rikoltis, kaj vendis la frukton. Fine jam li havis tiom da orotaleroj, ke ilin li devis enmeti grandan sakon, kion li devis porti sur sia dorso. Li ne lasis tion al sia servisto, ĉar li timis, ke la orotaleroj estos forŝtelitaj. Prefere li sola trenis la pezan sakon, eĉ li ĉiufoje forsendis ankaŭ la serviston pli frue hejmen por ke li nutru la dombestojn kaj li faru ordon en la domo.

En iu vespero irante hejmen kun la sako da orotaleroj, li devis trairi sur mallarĝa ponto super profunda rivero. Sube en la akvo estis akraj ŝtonoj kaj rokoj.

Antaŭ nelonge pluvis kaj pro tio la mallarĝa ponto estis glitiga. Li tion ne rimarkis. Jam vesperiĝis kaj li volis hejmeniĝi rapide, sed antaŭ ol enlitiĝi li planis rikolti pomojn de sur la pomarbo de la maljunulino, ke alitage matene denove li povu iri al la vendoplaco.

Li estis iranta sur la mezo de la ponto, kiam li ekglitis kaj falegis en la riveron. Tie li tuj mortis droniĝante en la akvon. Ankaŭ el la sako elfalis la orotaleroj kaj por ĉiam ili perdiĝis.

Oni ne serĉis la riĉulon, ĉar en la vilaĝo neniu ŝatis lin.

La maljunulino plu prizorgadis la ĝardenon kaj la miraklan pomarbon. Se iu deziris manĝi pomon, ŝi volonte donis al li unu belan, ruĝan frukton.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

-Onklo Adalberto-



Fabelofiguroj

Fabelofiguroj

